


BALDAŬ VENOS KRIST-NASKO, RAVELIN...
ONI FAROS LA ĈIUJARAN KRISTNASKAN VESPERMAN-ĜON, ĈU NE?
FESTENO... TREMANTAJ KANDELFLAMOJ, FAJRO ĈE LA KAMENO... BELA FESTO, KIUN MI NE RAJTAS PARTOPRENI.
ANKAŬ VI RAJTAS VENI, SE VI VOLAS.
ĈU VERE? SED... MI ESTAS NUR SERVISTO.
KIEL MI AŬDACUS ĈEESTI TIUN FESTON?
NE DIRU TION! VI ESTAS LA SOLA AMIKO, KIUN NI HAVIS KIAM NI ESTIS INFANOJ, ĈU MI NE PRAVAS?
STEFANINO, VENU AL LA FESTO, MI PETAS.
BO...
BONE!
KORAN DANKON, RAVELIN.
HE HE HE! MIA PLANO PROGRESAS VERE BONE! MI POVOS ĈEESTI TIUN KRISTNASKAN FESTON!



FRAŬLOJ, VI DEVAS IRI AL LA MESO ĈIJARE, ĈU BONE?
MALGRAŬ TIO, KE VIA PATRO NE ŜATIS IRI... VI NEPRE ĜUSTIGU TIUN MALBONAN KUTIMON!
FELIĈAN KRISTNASKON.
FELIĈAN KRISTNASKON, PASTRO.
TIN TON
BALDAŬ ALVENOS NIAJ GASTOJ.
IU DEVOS RESTI EN LA DOMO POR BONVENIGI ILIN, ĈU NE?
NI RESTOS HEJME POR BONVENIGI LA GASTOJN!
SED... FRAŬLOJ...


LA ETOSO ESTAS TIEL GAJA!
SED KIE ESTAS TIU NEKONATA PARENCO, KIUN LA FRATOJ MENCIIS ANTAŬE?
RAVELIN DIRIS, KE TIU PARENCO BALDAŬ VENOS...
TRE EKSCITE, ĈU NE?
HE HE, LASTATEMPE RAVELIN ESTAS IOM RIBELEMA, JOHANO...
BA!
KLAK
MI AĈETIS MULTEKOSTAN ROBON NUR POR ĈI TIU EVENTO...
RAVELIN POVOS RIGARDI NUR MIN DUM LA VESPERMANĜO...
MI BEDAŬRAS, KE NI ATENDIGIS VIN ĈIUJN!
ŜI ESTAS MIKAELINO, NIA MALPROKSIMA PARENCO.


HOOOO!
MIKAELINO!
SI... SIDIĜU, FRAŬLINO!
DANKON. MI NOMIĜAS MIKAELINO. ESTAS PLEZURO EKKONI VIN.



ŜIA VOĈO ESTAS KLARA KAJ OREL-PLAĈA!
ŜI PAROL-LAS FLUE KAJ BONE!
FRATO, MI JAM DI-RIS AL VI, KE ŜI ESTAS LACA.
HO...
MIKAE-LINO, VI VE-NAS EL BELKAUS, ĈU NE?
KIEL VI TAKSAS LA VOJAĜON PER VA-GONARO?
FRAP
NU, BONE!
ONI SUBMETU ŜIN AL EKZAMENO!
KAJ KIEL ASPEKTAS VIA URBO?
ĜI ESTAS TRE... SIMILA AL ĈI TIU LOKO. MULTE DA ARBOJ KAJ MULTE DA LAGOJ...
RAVELIN, MI PAROLAS AL MIKAE-LINO, ĈU BONE?
NU... MI JA ESTAS TRE LACA.


MI RESPONDOS TIOM DA DEMANDOJ, KIOM MI POVOS.
SED... NIA TUTA LANDO PLENAS DE LAGOJ KAJ ARBOJ, ĈU NE?
FRATO, SE VI DAŬRIGAS VIAJN DEMANDOJN, MIKAELINO NE POVOS MANĜI.
HO, RAVELIN, ĈIO ESTAS EN ORDO!
AL MI PLAĈUS AŬDI VIN LUDANTAN PIANON, MIKAELINO. RAVELIN DIRIS, KE VI BONE LUDAS.
ŜI ESTAS PLI KAPABLA OL MI PENSIS!
BONE, FINIĜIS LA VESPERMANĜO! NI IRU EN LA SALONON!
LA ARBO KAJ LA DONACOJ ATENDAS NIN!
FRATO! ŜI ESTAS LACA! NE DEVIGU ŜIN!
BONE, MI NE VOLAS ESTI MALĜENTILA... EBLE LA SEKVAN FOJON!


RAVELIN NE LASAS ŜIN SOLA EĈ DUM UNU SEKUNDO!
KIU ESTAS TIU INO? KIAM ONI PAROLIS PRI SURPRIZA GASTO... MI PENSIS, KE ONI VENIGUS BELAN VIRON.
SED ENTUTE LA ROBO HAVAS MALNOVAN STILON...
LA PUNTO DE ŜIA ROBO ESTAS BELA...
STEFANINO, MI RIMARKIS, KE VIA MIENO RIGIDIĜIS JAM DELONGE!
VI NE ESTAS RIVALO POR ŜIA NATURA ĈARMO.
ŜIA ĈARMO ESTAS SIMILA AL TIU DE MONSTRO, VERDIRE.


POR PLUKI FLOROJN KAJ FRAGOJN KUN GUSTAVO.
MI VOLAS REIRI AL TIU AR-BARO...
MI ESTAS LACA. MI EKKONIS MULTAJN HOMOJN KAJ MI UZIS MULTAJN VORTOJN...
KIO OKAZIS AL GUS-TAVO?
KIO ESTAS «PAĈJO»?
KIO ESTAS «MORTI»?
RAVELIN DIRAS, KE GUSTAVO... KE PAĈJO MORTIS...
ĈU TIO ESTAS LA BONA VIVO, PRI KIU RAVELIN PAROLIS AL MI?
KIAL TIU NIGRAHARA VIRINO RI-GARDAS MIN PER OKULOJ TIMIGAJ?
KIAL JOHANO, KIES RIGARDO SIMILAS AL TIU DE GUSTAVO, VOLAS DONI PROBLEMOJN AL MI?
LA RIGARDO DE RAVELIN NE SIMILAS AL TIU DE GUSTAVO. LA RIGARDO DE RAVELIN ESTAS AFABLA.
... KAJ TIO GAJIGAS RAVELIN-ON.
MI ESTAS ĈI TIE...



RAVELIN AKOMPANAS ŜIN SENĈESE!
KAJ ŜI APENAŬ PAROLAS! IO STRANGA OKAZAS ĈI TIE!
KIU ESTAS TIU STRANGA INO?!
«NUR IOM DA TEMPO», ĈU? ŜI LOĜAS EN LA DOMEGO DE ANTAŬ 10 TAGOJ!
ŜI ESTAS ILIA GASTO... IAM ŜI FORIROS!
NE... MI CERTAS, KE IO STRANGA OKAZAS.
RAVELIN, MI VOLAS REIRI AL LA ARBARO.
ĈI TIE ESTAS MULTAJ HOMOJ MALSAMAJ, VOĈOJ MALSAMAJ... MI ESTAS TRE LACA...
RAVELIN KAJ MIKAELINO!
HO... SED PRI KIO ILI PAROLAS?
...
...


NE, MIKA-ELINO!
KOMENCOJ ĈIAM ESTAS MALFACILAJ, SED VI AL-KUTIMIĜOS!
VIA ANTAŬA VIVO ES-TIS SIMPLE NETAŬGA POR VI!
MEMORU, KE PAĈJO NE REVENOS MALGRAŬ TIO, KE VI REIROS EN LA ARBARON.
あら……
MI PROVOS HELPI VIN KIEL EBLE PLEJ MULTE, ĈU BONE?
...
KIO?! ARBARO? ANTAŬA VIVO?
ĈU ŜI NE VENIS EL BELKAUS?
EN ĈI TIU ĈAMBRO TROVIĜAS LA PORTRETO DE LA PATRINO DE JOHANO KAJ RAVELIN.


HO! LA KOFRO NE ESTAS ŜLOSITA!
BELE!
MIRINDE! TIOM DA JUVELOJ KAJ PELTOJ!
ŜI SUR-HAVIS ANKAŬ TIUN RO-BON... KAJ TIUN!
KION SIGNI-FAS ĈI TIO?!
TIU ROBO...
LA ROBO, KIUN MIKA-ELINO SUR-HAVIS DUM LA VESPER-MANĜO!




ŜI VES-TIĜAS PER LA ROBOJ DE LA FOR-PASINTA SINJORINO!
ŜI VOLAS PROKSIMIĜI AL ILI... MI NE PERME-SOS TION!
ŜI ESTAS TRE RUZA!
ŜI KONKERIS LA KORON DE RAVELIN POR ENIRI EN LA BIENON!
MI SEN-MASKIGOS ŜIN, KAJ ŜI ESTOS FOR-PELITA!
MI NENIAM PERMESOS, KE TIA INO VENKU MIN!


JEN LA ĈIELO.
EN MIA ARBARO NE ESTIS NEĜO. KAJ LA ĈIELO NE ESTIS TIEL VASTA KAJ GRIZA.
ĈI TIO ESTAS NEĜO.
ĜI ESTAS MALVARMA, KAJ ĜI MALAPERAS KIAM ONI TUŜAS ĜIN.
HELA BLANKO ESTAS LA SIMBOLO DE VINTRO EN FINNLANDO.
SED KIO VERE ESTAS «SEZONO»? ĈU LA NEĜO MALAPEROS KAJ LA FLOROJ EKBURĜONOS KIAM TIU «PRINTEMPO» VENOS?
RAVELIN DIRAS, KE LA NUNA SEZONO NOMIĜAS «VINTRO».
ARBAROJ, LAGOJ... ĈIO ESTAS KOVRITA DE NEĜO.
MIA KORO DOLORAS MIN...
RAVELIN ESTAS TRE AFABLA, KAJ LI ASERTAS, KE MI ALKUTIMIĜOS AL ĈIO ĈI.



ESTAS MULTEGE DA HOMOJ, KAJ ILI PAROLAS MULTE!
ESTAS JA MULTAJ AFEROJ, KIUJN MI TUTE NE SCIAS.
KAJ TIU NIGRAHARA VIRINO NOMATA STEFANINO...
KIAL ŜI RIGARDAS MIN TIEL?
KIAL MI SENTAS MIN MALTRANKVILA KIAM ŜI RIGARDAS MIN?
KVIVIT
EKDE KIAM MI LERNIS PAROLI KIEL HOMO...
MI PERDIS LA KAPABLON KANTI.
STEFANINO!




VI ESTAS SOLA. KIA STRANGA VIDAĴO! ĈU NI BABILU?
...
FINFINE NI ESTAS SOLAJ, NUR ŜI KAJ MI!
RAVELIN KUTIME ESTAS ALGLUITA AL ŜI...
MI TUJ SEN-MASKI-ĜOS ŜIN!
KIAM VI FORIROS EL LA BIENO? ĈU POST PASKO?
PASKO?
PAS-KO?
KIO ESTAS TIO? MI NE-NIAM AŬDIS TIUN VORTON ANTAŬE!
VE, ĈU VI NE SCIAS, KIO ESTAS PASKO?
HO...
HO NE, MI JA SCIAS, JES... KIAL...?


MI HAVAS AMIKOJN EN BELKAUS. MI KONAS ĜIAJN KVARTALOJN. KIE VI DO LOĜAS?
...
NU, TIO NE GRAVAS!
EN KIU PARTO DE BELKAUS VI LOĜAS?
ĈU VI NE SCIAS LA NOMON DE VIA KVARTALO? STRANGA VIRINO!
LASU ŜIN JAM!
RAVELIN!
ĈAR ŜIAJ GEPATROJ FORPASIS, KAJ NI ESTAS ŜIAJ SOLAJ PARENCOJ VIVAJ.
MIKAELINO LOĜOS POR ĈIAM EN TIU ĈI DOMEGO.
KI... KIO?! KIAL?!




*Järvenpää en la finna. «Lagbordo», «laglimo».